# ATEISMO

**BULTENO DE ATEISTA TUTMONDA ESPERANTO-ORGANIZO**



## Muzeo en Torino: sekulara katedralo de scio, scienco kaj arto

**Majo 2023**

N-ro 36 | www.ateisto.org

# VORTO DE LA REDAKTORO

La eŭropa kontinento, kie okazas la plejmulto de niaj Universalaj Kongresoj ja plenplenas je katedraloj – majestaj strukturoj, kiuj imponas per siaj arĥitekturo, arto kaj etoso. Kompreneble, ili estis konstruitaj por religiaj celoj, kvankam nuntempe kaj religiuloj kaj senreligiuloj vizitas kaj admiras ilin. Kaj ankoraŭ hodiaŭ sufiĉe multe da homoj partoprenas en ili mesojn aŭ simple unuope venas por preĝi – ili adoras sian Dion, Jesuon kaj diversajn sanktulojn. Tamen, ja ekzistas alispecaj katedraloj en Eŭropo kaj aliaj kontinentoj – sekularaj katedraloj, kie oni iasence adoras sciencon, scion kaj arton, nome muzeoj. Sur la kovrilo, vi vidas halon en la renoma Egipta Muzeo de Torino, la urbo de la ĉi-jara UK.

En tiu muzeo certe multe de la objektoj estas ligitaj kun la antikva egipta religio kaj ties diversaj dioj kaj diinoj. Mumioj rezultis de la kredo je postmorta vivo. Sed la muzeo ne estas religia strukturo: kontraŭe, ĝi montras la fruktojn de jaroj da scienca laboro fare de arkeologoj kaj aliaj fakuloj. En tia muzeo, oni povas admiri la rezultojn de sciencaj penoj kaj lerni multon pri la mondo kaj ĝia historio kaj naturo. Kaj admiri niajn antikvajn antaŭulojn kaj iliajn atingojn. Se temas pri antikva aŭ eĉ mezepoka religieco, oni povas kompreni, ke antaŭ la alveno de la moderna, scienca epoko, homoj serĉis preternaturajn klarigojn por diversaj fenomenoj.

Tamen, ni vidas, ke ankaŭ en nia epoko, kiam scienco estas alte evoluinta, milionoj ankoraŭ havas religiajn kredojn, eĉ en la industriaj landoj. Religioj daŭras en nia 21a-jarcenta mondo, religiaj organizaĵoj agadas, homoj ĉeestas diservojn kaj preĝas. Samtempe, kiel artikoloj ĉi-numere indikas (kaj ankaŭ similaj troveblas en antaŭaj numeroj), en diversaj landoj, kredantoj malpliiĝas, preĝejoj malpleniĝas, eklezioj malkreskas, senreligieco kreskas kaj senreligiuloj plifortiĝas. Religiuloj kaj senreligiuloj ja devas kunvivi. Tial la redakcio de *Ateismo* decidis meti la jenan demandon: "Kion religiuloj povas lerni de ateistoj, kaj inverse?" Ni ne ricevis grandan reagon, sed venis iuj interesaj kontribuoj al kiuj la redakcianoj aldonis proprajn. La tiutemaj artikoloj plenigas la sekcion "Ateisma Vivo".

Fine, mi volas pardonpeti pro la granda malfruo de tiu ĉi numero. Ekde februaro mi estas konstante okupata pri mia patrino okdekkelkjara. Pro tiu situacio, mi faris entute 20 flugojn ĉi-jare: al Usono (du vojaĝoj) kaj Slovenio/Italio (kvin vojaĝoj) kaj reen al Pollando. Unue mi translokis ŝin de Usono al Slovenio (ŝia naskiĝloko), kie ŝi loĝis tri monatojn, kaj sekve al Pollando, kie ŝi nun loĝas en sufiĉe agrabla hejmo por pliaĝuloj apud Varsovio. Mi ĝenerale sentas min pli trankvila nun, kvankam problemoj daŭras. Interalie, pro akcidento, necesis porti ŝin al hospitalo lastatempe. Sed nun ŝi almenaŭ estas proksima, nur trans rivero, ne plu trans oceano.

# ATEISMA VIVO

## Ni kaj ili: ĉiuj lernu ĉefe *pri*

*Bill Maxey (Usono)*

Certe ĉiuj el ni konsentos ke religiuloj povas de ni lerni skeptiki. Lerni apartigi sin de sia di-regata medio kaj serioze konsideri aferojn el alies vidpunkto. Lerni ekestimi pli objektivan mondrigardon, pli racian pensmanieron kaj logikan rezonadon. Eĉ legado de unu bone verkita libro pri ateismo kaj ateistoj estus por ili bonega komenco. Preskaŭ ĉiu ateisto ja bone konas la "sanktajn" skribojn kaj la apologiojn de almenaŭ unu religio; reciproki tion ŝajnas juste, ĉu ne? Ateismaj ideoj meritas kaj rajtas esti aŭdataj, atentataj kaj respektataj de alipensuloj.

Tamen kredeble eĉ pli bonefike (kaj pli facile!) ol lerni *de* ni estus lerni *pri* ni. Ĉiu kredanto demandu sin: Kial oni malamas ateistojn? Kiel ateistoj minacas min? Ĉu vere ekzistas atestaĵoj kiuj montras tiujn "monstrojn" malhonestaj, malbonintencaj aŭ malvirtaj? Eĉ ekzistas ateismaj politikistoj je ĉiu nivelo kiuj nediskuteble oficas kompetente, senpartie kaj bonvole! Ĉiuj homoj spertas la samajn ĝojojn kaj afliktojn kaj same deziras pli bonan mondon. La ĉefa diferenco kuŝas en tio ke iuj forte opinias ke religio helpas realigi tiun revon dum la aliaj same forte kredas ke ĝi malhelpas—kaj ambaŭ bandoj emas agi laŭ propraj konvinkoj.

Konsiderante la alian flankon de la medalo, mi rimarkas kelkajn aferojn kiujn ni povus lerni de religiuloj. Verŝajne la vere imponan kaj enviindan plurnivelan organizadon kaj mirindajn strategiojn por trudpeti monon kiujn la diversaj religioj—kaj foje lerte ruzemaj trompistoj—laŭgrade akrigis dum jarcentoj povus efiki bonrezulte ankaŭ en nia sendia mondo. Tamen mi preteratentu tiujn ĉar pli allogas min malpli grandioza temo: la konstanta engaĝiĝo de la plimulto de kredantoj kun la materialoj kiu donas al ili ilian sektecan identecon.

Laŭ miaj spertoj kun kristanaj preĝejoj ĉi tie en Usono— kredeble la situacio iel malsamas en aliaj landoj—la fideluloj ne nur recitas kredojn, elbuŝigas preĝojn kaj partoprenas diservojn sed ankaŭ studas la fontmaterialojn de sia religio, kutime kune kun aliaj samsektanoj en malgrandaj grupoj. Tio okazas kadre de la tiel nomataj "dimanĉa lernejo" kaj la (kutime) merkreda "biblia studado" por adeptoj de ĉiu aĝo. La ĉeestantoj dum pli-malpli unu horo enfokusigas biblian elĉerpaĵon aŭ alian temon—historian aŭ aktualan—kaj konsideras ĝin el diversaj perspektivoj, celante pli profundan komprenon kaj eventuale inspiron. Malgraŭ tio ke la rezultoj ne devojiĝas for de kliŝaj interpretoj, el pozitiva vidpunkto, la partoprenantoj ja konstante legas kaj aktive pripensas la signifojn, valorojn kaj eventualan

"realmondan" aplikadon de siaj kredaro kaj sanktaj skriboj. Interreta serĉado certigas al mi ke ne nur kirkoj sed ankaŭ sinagogoj, temploj kaj moskeoj disponigas religiajn lecionarojn al siaj preĝejanaroj. Islama hadiso admonas ke "la serĉado de scioj estas deviga por ĉiuj".

Ni ateistoj do al nia profito povus sekvi tiun ekzemplon, eĉ sen la helpo de instruantoj aŭ kunlernantoj. Niaj temoj povus inkluzivi la longan kaj konindan historion de liberpensado en pluraj mondpartoj kaj sciojn pri la kuraĝuloj kiuj suferis pro siaj malpiaj asertoj, foje eĉ ĝis brulmortigo. Ankaŭ ni havas niajn sanktulojn kaj martirojn! Ni legu pri iliaj oferoj kaj afliktoj kaj donu al ili merititajn rememorigon kaj omaĝon.

Evidente tiu historio daŭras eĉ hodiaŭ. Multaj aferoj nuntempe efikas sur ateistojn, ĉefe la klopodoj trudi sektecajn leĝojn al ĉiuj civitanoj kaj la daŭra diskriminaciado (aŭ foje persekutado) kiun suferas sendiuloj en preskaŭ ĉiu lando. Valoras ĝisdatiĝi pri tiaj fenomenoj, sekvi kaj zorge konsideri ilin. (Tiun taskon faciligas tiu ĉi laŭdenda organo de ATEO, kiu disponigas vere variajn kaj legindajn kompilaĵojn de informaj kaj pensigaj artikoloj.)
Plue, ni povas ekscii pli pri la konataj ateistoj en nia propra lando, certe pri la apologiistoj kaj ĉefaj porparolantoj sed ankaŭ pri la



famuloj kaj (speciale) la politikistoj kiuj moviĝas—ofte kaŝe—inter ni. Utilas ankaŭ—aparte ĉar ni estas esperantistoj—ekkoni kaj kunsenti la situacion rilate la statuson de niaj "samnedianoj" en ĉiuj landoj.

Kompreneble, ankaŭ eblas esplori pli la filozofian flankon de ateismo, konatiĝi kun la diversaj perspektivoj kaj argumentoj de la klasikaj aŭtoroj kaj ĝui la elokventon de niaj elstaraj oratoroj. Por tiuj kiuj interesiĝas pri beletraĵoj ekzistas literaturo kiu satiras religion, surscenigas intrigojn en sendia medio aŭ aparte prihimnas la naturan mondon kaj ties mirindaĵojn.

Senkonsidere de la elektita studobjekto, kernas nur tio ke ni celkonscie pli profunde minu la fascinajn fontojn de liberpensado kaj ĝiaj efikoj en niaj socioj. Mi do proponas ke ni—simile al niaj piaj najbaroj—dediĉu regulan kaj specifan tempon al tia okupo. Plua kaj valora paŝo estus konigi al aliaj (per afiŝoj al MiaVivo) interesajn informojn, ideojn aŭ rekomendojn kiuj naskiĝas rezulte de fekundaj esploroj. Ni povas certe vigligi ATEO-n per aktiva kundivido de spertoj kaj reagoj. Pensigaj diskutoj plivalorigus la organizaĵon por ni ĉiuj.

Ni nuntempaj ateistoj estas posteuloj de multaj riskemaj kuraĝuloj—kaj sendiuloj kaj herezuloj—kiuj tra multaj jarcentoj preparadis la vojon al pli racia mondo. Ni pli bone komprenu nian lokon sur tiu vojo kaj nian rolon kiel tiuj kiuj nun portas la torĉon de libereco disde religio. Ni klopodu fariĝi pli konsciaj kaj ĉiam pli bone informitaj pri ĉio kio tuŝas ateismon en niaj landoj kaj—aparte ĉar ni estas ankaŭ esperantistoj—ankaŭ en la cetera mondo. La religiuloj disponigas al ni taŭgan modelon por eduki nin kaj akrigi nian komprenon pri tia rolo. Ni profitu ĝin.

## La malsamaj vojoj de religiuloj kaj ateistoj

*Pino Lalli (Italio)*

Religiuloj bedaŭrinde bezonas helpon de la ĉiela sfero kaj ne povas kompreni ke la homo, sola, kapablas fari siajn elektojn. Iasence neplenkreskuloj bezonas ankoraŭ gepatran protektadon dum sia tuta vivo. Pro tio oni inventis religion, kiu kontentigas la intiman neceson voki helpanton kontraŭ la malfeliĉo. Mi sekve pensas, ke religiuloj povas lerni nenion de ateistoj, ĉar iliaj pensoj iras tre malsamajn vojojn.

Inverse, ĉu mi, ateisto, povas lerni ion de religiuloj? Certe ne, pro la sama kialo. Mi povas nur kompreni religian konduton, kaj lukti kiam ĝi kondukas al obtuziĝo, t.e. al malagnosko de la elementaj principoj de la nuna homa kunvivado.

Parenteze, mi tre ŝatas budhismon, kiu batalas kontraŭ la suferado de ĉiuj estaĵoj, vivantaj aŭ ne. Aldone, ĝi toleras ĉiujn aliajn, ĉar ne ekzistas breĉo aŭ diferenco inter personoj kaj aliaj: **mi estas la universo kaj la tuta mondo estas mi.**

# De malsamaj pensmanieroj ĉiuj povas lerni

*Franciska Toubale (Aŭstralio)*

La homoj emas grupiĝi laŭ komunaj ŝatoj aŭ pensmanieroj. Oni sentas sin pli komforta inter homoj, kiuj samopinias. Tiu sameco kreas senton de sekureco kaj certeco. Sed aliflanke oni lernas nenion. Necesas akcepti ne esti tiom certa, kompari siajn ideojn al tiuj de personoj kun malsama vidpunkto por ekvidi aspekton de problemo, kiun ni tute preteratentis. Tiam oni akiras la okazon pripensi kaj juĝi, ne per emocioj sed per rezonado, analizado de faktoj kaj spertoj, ĉu ankaŭ tiu vidpunkto validas. Tiel eblas kutime havi pli larĝan vidon de problemo.

Ĉu temas pri ateisto aŭ religiulo, de homoj, kiuj apogas sin sur siaj certecoj aŭ sur la reguloj, kiujn ili lernis de la infanaĝo kiel neŝanceleblan veron, ne eblas multon lerni. Ili ne argumentas, ili obeas. Tamen ni ĉiuj devas provi vivi pace kaj kiel eble plej harmonie kun niaj familianoj, najbaroj, la civitanoj de nia lando. Ni kune kreas la socion en kiu ni vivas per nia ĉiutaga konduto, per elekto de la politikistoj, kiuj reprezentos nin en la decido-instancoj. Por sukcesi necesas koni la pensmanieron de kiel eble plejmulte da homoj.

Mi tre ŝatas programon de la kanalo ABC (Aŭstralia Elsenda Korporacio) "God forbid" (Dio malpermesu). Kiel ekzemplon mi citos freŝdatan elsendon en kiu budhano, islamano, kristano, ateisto argumentis pri perfekteco. Laŭ kelkaj nur Dio estas perfekta, laŭ aliaj ĉiu homo nepre celu atingi perfektecon. Do ĉu la vorto signifas ekzakte la samon por ĉiuj? Ĉu strebi al perfekteco garantias pli altan nivelon de humaneco aŭ ĉu male tio estas obstaklo? Fine ili traktas homajn probemojn en la lumo de sia propra sinteno. La interŝanĝo estas pozitiva por ĉiuj. Kompreneble nenies celo estas konvinki la aliajn partoprenantojn, ke oni mem pravas aŭ havas superan aliron.

Restas en mia menso kiel tre bedaŭrinda sperto, kunveno de la anoj de la Komunisma Ligo. Mi volis scii ĉu la postuloj de la laboristoj estis almenaŭ parte plenumitaj post longa striko. Tio estis en la 1990aj jaroj. En Parizo enmigrintoj okupis malplenajn konstruaĵojn kaj la polico ricevis la ordonon ilin forigi. Abato Pierre* iris al tiuj konstruaĵoj por eviti ilian forigon kaj alvokis por ke pli da homoj venu por malhelpi la plenumon de la ordono. La anoj de la Komunisma Ligo laŭdis la agon de abato Pierre kaj mense tion subtenis, sed diris, ke ili ne povas kuniri ĉar ne eblas, ke oni vidu ilin kun iu pastro. Kial ne? Ili havis la saman celon. Kial ne unuiĝi? Nur pro etikedo? Pro mensa muro, kiu dividas ilin? Kia bedaŭro!

lu – kiu ajn estu lia/ŝia religio, pensosistemo – kiu ne lasas sin limigi per sia kredo, certe povas multe lerni de tiuj, kiuj elektis malsaman vojon.

**Abato Pierre estas fama pastro en Francujo, kiu en 1954 dum malvarmega vintro ekkonsciigis siajn samlandanojn pri la skandalo lasi malriĉajn familiojn vivi en ladurbaĉoj. Ĝis sia morto li luktis por plibonigi iliajn vivkondiĉojn. Li ankaŭ kreis la centrojn Emaus, kiuj donas duan ŝancon aparte al eksmalliberuloj.*

# Ateistoj kaj religiuloj: ideoj pri reciproka lernado

*Nyegosh Dube (Pollando)*

Kion religiuloj povas lerni de ni ateistoj? Eble memevidente, antaŭ ĉio, ili povas lerni la kapablon pridubi la ekziston de Dio aŭ dioj, aŭ almenaŭ la kapablon analizi la aferon kaj demandi al si mem "Kial mi kredas je Dio?" kaj "Kiaj pruvoj fakte ekzistas por la ekzisto de Dio?". Sed ili ankaŭ povas fari al si demandojn kiel: "Kial ekzistas malbono, kial teruraĵoj okazas al homoj, se ekzistas bona Dio zorganta pri la homaro?" kaj "Kial religiaj kredoj tiom dependas de geografiaj hazardoj, konsidere ke islamanoj troviĝas plejparte en difinita geografia mondospaco, hinduoj ĉefe en Barato, katolikoj en suda Eŭropo kaj Latinameriko, ktp?" Krome, religiuloj povas lerni kritike taksi unuopajn religiojn, inkluzive la proprajn. Kompreneble kristano povas kritiki islamon kaj inverse, sed pli malfacilas kritiki sian propran religion, se temas pri ĝiaj kredoj, dogmoj, ritoj kaj reguloj.

Proksime ligita al la ĉi-supro estas serioza pensado pri la akordo-malakordo inter religio kaj scienco. Ekzemple, kristanoj konsideru la malkongruon inter la dia kreado de la homaro kaj ĝia evoluo science pruvita. Krome, se ili kredas ke evoluo estas mem dia ilo, ili demandu sin ĉu vere procezo, kiu rezultas de multaj hazardoj, povas esti die gvidata. Hinduoj aliflanke povas argumenti, ke la hinduisma aliro al la kreado de la universo ja akordigeblas kun scienco, ĉar ĝia tempo-etendiĝo ampleksas miliardojn da jaroj. Tamen ĉu la bluhaŭtaj, multbrakaj kaj bestkapaj gedioj de hinduismo havas ian ajn sciencan bazon?! Multaj religiuloj simple apartigas sian akcepton de scienco disde sia religia kredo. Usona evolubiologo Stephen Jay Gould (agnostikulo) proponis la koncepton de "neinterkovrantaj sferoj" (*non-overlapping magisteria* angle), laŭ kiu scienco kaj religio apartenas al tute apartaj sferoj. Fama brita biologo kaj ateisto Richard Dawkins prave malakceptis tiun ĉi koncepton, komentante ke religiaj asertoj ja tuŝas la materian universon.

Sekva afero, kiun religiuloj povus lerni de ni ateistoj, estas ke moralo

ne dependas de kredo je Dio, ke oni povas esti bona persono kaj konduti morale sen religia kredo, kaj inverse ke religio ofte instigas homojn al malbono, kiel montras al ni interalie islama terorismo, interreligia perfortado en Barato kaj la konflikto en Israelo-Palestino, kaj historie la Inkvizicio, la krucmilitoj kaj la kontraŭjudaj pogromoj. Ateistoj plejparte bone kondutas, ne trompas, ŝtelas aŭ mortigas, agas socieme, helpante aliajn kiam necesas. Tiu fakto devus pensigi religiulojn pri la ligo inter moralo kaj Dio, kaj inter moralo kaj religio. Se Dio kaj religio ne necesas por morala konduto, kia bono venas el ili? Sed almenaŭ tiu konstato pri la konduto de ateistoj devus konduki al forigado de antaŭjuĝoj kontraŭ ili kaj plena akceptado de ateistoj en la socio – en Usono, ekzemple, ankoraŭ ege malfacilas por ateisto venki en elekto, pro la sociaj antaŭjuĝoj kaj malaprobado.

Kaj kion ni ateistoj povas lerni de religiuloj? Ni ateistoj devas lerni kompreni, ke por multaj homoj, sciencaj klarigoj kaj priskriboj ne sufiĉas, ne kontentigas (kio parte rilatas al la apartigo menciita supre). Ili bezonas iun alian dimension de ekzistado – spiritan, pretermaterian – kaj ofte religio plenumas tiun bezonon. Nu, tio ĉi certe malfaciligas ateisman argumentadon. Ni argumentas per scienco kaj racio, sed la homoj, kiujn ni celas, ĝuste strebas al io preter scienco. Kompreneble, religio plejparte estas socie reproduktata fenomeno




*La Eŭtifrona dilemo*

heredigata de unu generacio al la sekvonta – homoj kreskas en iu religio, ne multe pensante pri sia kredo, sed eble sentante metafizikan bezonon. Do, la demando estas: ĉu eblas por ateistoj argumenti en maniero, kiu atentas tiun bezonon? Ĉu ni povas konvinki, ke eĉ pli mirinde kaj magie estas imagi, ke nia grandioza universo kreiĝis *sendie*, kaj ke ĝi en si mem estas dieca?

Alia afero, kiun ni povas lerni de religiuloj, rilatas al temo jam diskutita: tiu de moralo, konduto, devoj. Religioj instruas siajn anojn – pere de siaj sanktaj libroj kaj alispecaj tekstoj, kaj pere de tiuj, kiuj interpretas ilin kaj predikas, nome pastroj, imamoj, rabenoj, guruoj ktp, sed ankaŭ la laikuloj, kiuj instruas en t.n. dimanĉaj lernejoj. Ofta kritiko de religiuloj kontraŭ ateistoj estas ĝuste, ke al ni mankas tiaj instruoj. Nu, klare, kiel mi asertis supre, la granda plimulto da ateistoj kondutas morale kaj socieme. Tamen eble estus bona ideo havi nian propran bazon de instruaj skribaĵoj, se ne "sanktaj", almenaŭ el fontoj historie respektataj, ekzemple Konfuceo, Aristotelo kaj Marko Aŭrelio, sed ankaŭ Platono, kies Eŭtifrona Dilemo klare indikas, ke moraleco estas sendependa de dioj. Ni estu kapablaj argumenti, prezentante sekularajn fontojn de moralaj instruoj. Tio eble helpus atingi la akceptadon fare de religiuloj de tio, kion mi menciis supre – ke moraleco kaj etika konduto ne dependas de religia kredo.

Fine, estas la argumentado, ke religioj plenumas gamon da viv-bezonoj kaj ni ateistoj povus profiti per imitado de diversaj iliaj praktikoj. (Nu, mi mem ĵus proponis ian imitadon!) Jam humanismaj asocioj en kelkaj landoj (ekz. Norvegio, Islando, Britio) ofertas servojn rilate al viv-eventoj, kiuj paralelas tiujn de preĝejoj. En nia propra asocio estis propono, ke ateistoj havu "maldiservojn" ĉiusemajne. Anna Lowenstein, en interesa kontribuo en tiu ĉi numero, memorigas nin pri sia iama ĉi-revua recenzo de libro de Alain de Botton (*Religion for Atheists* – Religio por Ateistoj). Li, mem ateisto, argumentis ke religioj ofertas multajn bonajn ideojn, kiujn nekredantoj povus pruntepreni sen akcepti la kredojn de tiuj religioj. La ĉefa bono kaj utilo de religio verŝajne estas socia/komunuma kuneco kaj sento de apartenado. Kiel Anna skribas, tion donas ankaŭ la Esperanto-movado kaj diversaj aliaj agadoj. Sed ne nur tio: multaj religiaj organizaĵoj estas socie engaĝitaj kaj helpas homojn, kaj multaj nereligiaj organizaĵoj agas simile.

Certe ekzistas aliaj aferoj, kiujn religiuloj povus lerni de senreligiuloj, aŭ senreligiuloj de religiuloj. Por ke socio funkciu bone, necesas ke ambaŭ kapablu kunekzisti, interparoli kaj kiom plej eble interkompreniĝi. Tamen tutcerte, en multaj socioj, ateistoj / senreligiuloj estas minoritato, kiu suferas diversajn gradojn de socia ekskludiĝo, se ne persekutado. La religia plejmulto devas lerni aŭskulti kaj respekti la opiniojn de ni senreligiuloj, kaj ni senreligiuloj devas lerni kiamaniere atingi tiun aŭskultatecon kaj respekton.


# Ĉu nekredantoj povas ĝui la avantaĝojn de religio?

*Anna Lowenstein (Britio)*

Membriĝi en preĝejo, sinagogo, moskeo aŭ templo longigas la vivodaŭron. Tio ne estas aserto de religiuloj, sed konkludo de seriozaj sciencaj studoj, laŭ artikolo aperinta en la brita gazeto *The Observer* la pasintan decembron.

Tio verŝajne ne estas konkludo, kiu aparte plaĉos al la legantoj de *Ateismo*. Tamen ĝi estas la rezulto de longedaŭraj esploroj, laŭ kiuj oni sekvis la sanon de grupoj de homoj dum jaroj aŭ eĉ jardekoj. Ĉiuj studoj – kaj ĝis nun aperis multaj – trovis, ke homoj kun aktiva religia partopreno havas malpli altan riskon pri deprimiĝo, streĉo, malpli da kormalsanoj kaj malpli da risko pri morto pro kancero.

Ne temas pri unuopaj hazardaj studoj. Ekzistas multaj tiaj studoj, kiuj esploris homgrupojn tra la mondo, kun rimarkinde koherajn rezultojn. Ekzemple d-ro Laura Wallace ĉe la Universitato de Ĉikago ekzamenis nekrologojn de pli ol 1000 homoj tra la tuta Usono, por vidi, ĉu la nekrologo mencias la religian apartenon de la koncernata homo. Tio en si mem estas indiko, ke por tiu homo la religia kredo estis signifa parto de ties identeco. Kiam ŝi eldonis siajn rezultojn en 2018 ŝi raportis, ke tiuj homoj kies religia kredo estis aparte menciita en la nekrologo, vivis mezume 5,6 jarojn pli longe ol tiuj, kies religia aparteno ne estis menciita. En dua studo estis eĉ pli granda diferenco: proksimume dek jaroj. Ŝi komentis, ke tio estas simila al la avantaĝo, kiun havas nefumantoj kompare kun fumantoj.




*Alain De Botton kun sia libro por ateistoj*

Kion tio signifas? Ĉu ĝi estas pruvo pri la ekzisto de Dio? Fakte, ne. Unu klarigo povus esti, ke religiuloj emas vivi pli "sane" ol nekredantoj. Esploroj montras, ke homoj, kiuj regule vizitas preĝejon, malpli probable fumas, drinkas, prenas drogojn, aŭ seksumas sen protektado (kvankam ekzistas esceptoj). Tiu pli sana vivkonduto povus sekvi de la religia instruado mem, sed povus esti ankaŭ aliaj klarigoj. Ekzemple, ke homoj, kiuj havas sufiĉan sinregon por ellitiĝi dimanĉe matene, ankaŭ havas sufiĉan sinregon por eviti aliajn tentojn.

Pli grave, tamen, aparteni al religio povus alporti psiĥologiajn avantaĝojn. La ĉefa estas socia kontaktado kun aliaj homoj. Longedaŭraj emocia izolado kaj soleco en si mem kaŭzas streĉon, el kio sekvas negativaj fizikaj ŝanĝiĝoj, kiuj damaĝas la korpon kaj altigas la probablecon pri malsaniĝo.

Ankaŭ preĝi por la bonfarto de aliaj homoj povas havi pozitivajn sekvojn, laŭ nova studo eldonita de la profesoro Gail Ironson ĉe la Universitato de Miamo. Dum 17 jaroj ŝi sekvis grupon de homoj kun HIV. Ŝi trovis, ke tiuj kiuj regule preĝadis por aliaj homoj travivis signife pli longe kompare kun tiuj, kiuj preĝis nur por si mem. Tiu rezulto validis eĉ kiam ŝi prenis en konsideron aliajn faktorojn rilate al la kuracado ks.

Interese, Ironson ankaŭ trovis, ke la malsano progresis pli rapide en tiuj pacientoj, kiuj kredis je venĝema dio, kontraste kun tiuj, kiuj vidis Dion kiel kompateman figuron.

Krom kuraĝigi socian kontaktadon, religioj helpas al homoj kultivi pozitivajn emociojn, kiuj kontribuas al ilia mensa kaj fizika bonfarto, kiel dankemon kaj miradon. Diversaj studoj montras, ke se oni regule dediĉas pensadon al la pozitivaj aspektoj de la propra situacio, tio malhelpas, ke oni glitu en negativan mensostaton, kiu obligas streĉon. Homoj, kiuj regule dankadas Dion dum siaj preĝoj, pli emas kultivi tiun protektan emocion.

Mirado estas la emocio, kiun oni sentas, kiam oni pensas pri io multe pli vasta kaj grava ol oni mem. Tio helpas al la homoj rigardi preter siajn ĉiutagajn zorgojn.

Laste, kaj tre grave, religiaj kredoj donas al la homo senton, ke ili havas celon en la vivo. Denove tio kontribuas al la fizika sano kaj pli longa vivo, kaj protektas kontraŭ streĉo.

Leginte tiun artikolon, mi memoras similan argumenton, kiun mi iam legis en interesa libro de Alain de Botton *Religion for Atheists* (Religio por Ateistoj). Mia recenzo pri tiu libro aperis en n-ro 24 de ĉi tiu revuo (Majo 2017, p. 21). De Botton koncentriĝis pri la pozitivaj aspektoj de religioj, kiuj ne rilatas al la kredo mem, sed estas aparte gravaj por ties adeptoj. La dua ĉapitro nomiĝas ĝuste "Komunumo", ĉar la verkinto rekonis, ke tio verŝajne estas la plej grava aspekto de la religia vivo por religianoj. En tiu ĉapitro li proponis, kiel ateistoj povus rekrei tiun avantaĝon en la sekulara vivo.

Multaj el la trajtoj ligitaj kun aktivado en religia komunumo troviĝas ankaŭ en nia aktivado en la Esperanto-movado. En mia recenzo mi komentis, ke novaj esperantistoj ofte fariĝas ekstermezure entuziasmaj, kaj ke ilia entuziasmego ŝuldiĝas ne simple al la lingvaj aspektoj de Esperanto, eĉ ne al la "interna ideo", sed ĉefe al la komunumo, kiun ili trovas, kiam ili ekaktivas. Unu el la grandaj malbonoj de la moderna socio estas la izoleco kiun multaj homoj spertas, kaj tio certe havas tre negativan sekvon por la vivodaŭro. Se oni

aktivas en la Esperanto-movado, oni regule renkontas aliajn homojn kaj babilas kun ili ĉe loka grupo, en kongresoj kaj ankaŭ rete. Same kiel religia komunumo, la Esperanto-komunumo estas aparte akceptema pri homoj, kiuj ne estas bone integritaj en la normala socio, inkluzive de tiuj kun fizikaj aŭ psiĥologiaj problemoj. La sola kondiĉo estas, ke ili lernu Esperanton.

La verkinto de la artikolo en *The Observer* ne mencias la Esperanto-movadon, sed ŝi ja proponas, ke volontulado en iu asocio donas multajn el la avantaĝoj, kiujn oni ricevas per agado en religia movado. La simpla fakto helpi aliajn homojn kontribuas al la propra bonfarto, kaj donas senton ke oni okupiĝas pri io pli granda ol oni mem. Samtempe tio forigas senton de izoliĝo, malfermante vojon al amikeco kaj al pli da sociaj kontaktoj.

La verkinto ankaŭ proponas, ke povus esti utile dediĉi kelkajn minutojn ĉiutage al afablaj pensoj pri siaj geamikoj, pri nekonatoj, eĉ pri malamikoj. Tio havas similecon al la kristana kutimo preĝi por aliaj homoj, kaj ŝi ankaŭ komparas ĝin kun budhisma principo, kiu nomiĝas *mettā*. Se oni faras tion regule, ĝi pliigas la proprajn sentojn pri socia kuneco kaj empatio por la aliaj, kaj tio havas pozitivajn sekvojn por la mensa sano. Ĝi ankaŭ ŝanĝas la manieron laŭ kiu la homoj traktas unu la alian en la praktika vivo.

Krome la verkinto sugestas, ke oni tenu taglibron en kiu, fine de ĉiu tago, oni listigu la okazaĵojn, pri kiuj oni estis kontenta. Ŝi ankaŭ rekomendas, ke oni tre aktive dankadu la homojn, kiuj donis ian helpon. Fari tion, laŭ iuj studoj, malpliigas sentojn de streĉo kaj plibonigas la mensan bonfarton. Por kultivi emociojn de mirado, ŝi sugestas, ke oni regule promenu en la naturo, vizitu imponan konstruaĵon, aŭ eĉ spektu mirindan filmon.

La sugestoj en la lasta alineo povus ŝajni bagatelaj. Sed efektive mi iam mem spertis la pozitivajn sekvojn de ekzerco dum lingva leciono, en kiu ĉiuj membroj de grupo devis laŭvice rakonti pri la plej bela afero, kiu okazis en tiu tago, kaj ni ankaŭ devis rakonti pri io, kion ni faris dum la pasinta semajno por helpi alian homon. Fine de la sesio, ĉiuj membroj de la grupo estis ridantaj kaj feliĉaj. Mi estis tiom trafita de la pozitiva sekvo de tiu ekzerco, ke dum iom da tempo mi eĉ faris tion antaŭ ol endormiĝi. Sed iom post iom, havante aliajn aferojn por pripensi, mi ĉesis fari tion. La avantaĝo de aparteno al religia komunumo estas, ke oni havas specifan rutinon kaj kadron por tia agado. En la sekulara vivo necesas krei tion mem.

*Fonto: "Beyond beliefs: does religious faith lead to a happier, healthier life?" de David Robson. The Observer, 3 dec. 2022. https://www.theguardian.com/world/2022/dec/03/beyond-beliefs-religious-faith-happier-healthier-life*

# Pri la nocio de dio


*Ermito / GIM In-hong (Koreio)*

Partopreninte diskuton inter ateistoj por la unua fojo, mi tuj devis konstati, ke en tiu rondo la nocio de dio estas firme fiksita, nome ununura dio ĉiopova kaj ĉioscia kiel kreinto de la universo, do nur laŭ kristanismo.

Nia Esperantujo estas universala kaj Esperantistoj devenas el vere diversaj fonoj kulturaj. Tial, Esperantistoj ankaŭ devus bone scii laŭsperte, ke en nia mondo oni kredas je diversaj dioj ne nur unu. Por havi diskuton signifoplenan kaj fruktodonan, ankaŭ la nocio pri dio devus esti varia, miaopinie, ne kiel ĝis nun. Tiucele nun mi intencas prezenti unu ekzemplon, nome pri la nocio de dio laŭ budhismo.

Laŭ la instruo de Budho, dio aŭ dioj estas superhomaj sed ankoraŭ ne plene iluminiĝintaj, do malsuperaj ol Budho, kaj Budho mem konstatis, ke antaŭ li estis budhoj kaj ankaŭ post lia morto ili estos.

La kerno de budhisma doktrino estas la neekzisto de 'mi'-eco, do memcentrisma pensmaniero kiel la deirpunkto de ĉies vivoj. Laŭ la memcentrisma vidpunkto eĉ la universo akiras ian signifon nur kiam mi komprenas min kiel la centron de ĉio en tiu ĉi mondo. Sed ĉi tiu starpunkto riskas provoki militon en la nomo de dio sankta kaj absoluta. Tamen mia celo estas nur informi la



*Statuo de Budho, insulo Lantau, Hongkongo (Foto de: Wong Yu Liang)*

membrojn de ATEO, kiuj eventuale ankoraŭ ne scias pri tiu doktrino.

Budho, post la plena iluminiĝo (kio signifas, ke nun ĉio kristalklaras kaj nenio restas en tenebro), povis komplete konscii, ke ni homoj ordinaraj suferas ĉar ni ne scias, ke ni ĉiuj ankaŭ estas budhoj sed nun iluzias nin esti nur ordinaruloj kaj tial vivas mizere, ne tiel meritplene kaj brile kiel Budho, do pli ol dio!

Gepatroj naskas siajn idojn kaj tiel transdonas ankaŭ genajn informojn. Dum la ĉiutaga vivo homoj alfrontas diversajn situaciojn kaj tiel vole nevole akumuliĝas sennombraj informoj, kiuj aldoniĝas al la datumbanko heredita de gepatroj. Tiel laŭgrade formiĝas identeco en la nomo de 'mi' kaj ĝi funkcias kvazaŭ la sorto. La enhavo de 'mi'-eco sidas en la nekonscio kaj ĝi seninterrompe, eĉ en sonĝo, diktas kion kiel kiam fari kaj ĉefrolas en la vivo de ĉiuj ordinaruloj. Pro subtila sed vere obstina, tial apenaŭ supervenkebla, influo de la nekonscio, oni nur malofte sukcesas konscii kie kuŝas la kaŭzo de la propraj fuŝoj. Kvankam oni firme kredas pri sia 'mi'-eco, oni finfine konstatas ĝian falsecon post sistema kaj rigora demandado al majstroj de meditado.

Al la demando 'kiu vi estas?' oni responde donas siajn nomon, profesion ktp kaj ĉefine nur agnoskas sian nescion pri si mem. Majstroj tiel demandadas por rimarkigi siajn disĉiplojn pri la falseco de ties mi-centrismaj pensmanieroj kaj tiel povi gvidi al plena iluminiĝo, do perfekta liberiĝo de kateno de karmo aŭ prapeko. La vorto 'karmo' estas valorneŭtrala dum 'prapeko' estas ŝarĝita per veneno. Per tiu koncepto, fiekleziaro pasintece elĉerpe misuzis senkulpajn kredantojn. La esprimo 'prapeko' tro facile donas kulposenton kiu subtile, tamen tre forte, ŝarĝas la psikan vivon. Tial necesas elradikigi ĝin, se tio eblas.

La dio de kristanismo kaj aliaj monoteismaj religioj tute ne liberas de tiu mi-centrisma pensmaniero kaj tion oni povas tuj konstati je Lia dikto, ke nur pere de Mi vi homoj povas atingi paradizon kaj neniujn aliajn ol Min adoru vi piaj kredantoj. Tiu dio post nekompleta iluminiĝo nun posedas eksterordinaran kapablon kaj kapablas transdoni saĝajn mesaĝojn, sed ankoraŭ obstinas pri 'si mem' kaj tial ankaŭ suferas same kiel ordinaruloj. Malkontenta pri la evoluo de siaj homaj kreaĵoj, li kapablas kaŭzi tutplanedan amasmortigan diluvon, kiun travivas nur Noa kaj lia familio kaj diversaj best-paroj. Vere absurda kaj kruela amasbuĉado.
Kio estas la diferenco inter homoj kaj tiu dio? Nur kelkaj superhomaj kapabloj kaj aliaj ceteraj ecoj tamen sufiĉe homaj. Diametre kontraste al tio, Budho eĉ malkonsilis adori Lin kaj admonis diligente sekvi liajn instruojn en la ĉiutaga vivo. Farante tion, ĉiuj finfine mem iluminiĝus, kaj mem fariĝus budhoj plene liberaj de suferado en la vivo. Li mem estas nur fingro montranta la lunon kiel budhigan saĝon kaj tial tute ne necesas, ke oni adoru lin. Kontraste kun tio, la kristana/islama/juda dio senlime ĵaluzas, kondamnas kaj malbenas.
Kiel jam menciite, mi tute ne intencas kritiki aŭ eĉ primoki diojn mi-centrismajn sed nur informi. Tio estas temo, pri kiu ni anoj de ATEO povus estonte diskuti por saĝigi nin. Mi elkore deziras, ke mia prezento konduku nin ĉiujn al pli signifoplena kaj fruktoriĉa diskutado dum venontaj kongresoj kaj aliaj aranĝoj verdaj.

# Kruela religio

*Anna Lowenstein (Britio)*




*Detalo montranta inferon en "La Lasta Juĝo" de Fra Angelico (Fonto: Wikimedia Commons)*

Mi ĵus aŭskultis la Rekviemon de Verdi, nekredeble brilan kaj draman muzikaĵon. Rekviemo estas katolika meso por mortinto, tamen la muziko de Verdi estas tiel belega, ke ĝi pli ofte estas prezentata en koncertejoj ol en preĝejoj.

Kiam Verdi verkis ĝin inter 1868 kaj 1874, virinoj ne rajtis kontribui al preĝejaj ritoj kiel kantistoj, sed tiu verko bezonas du inajn solistojn krom virinaj voĉoj en la ĥoro. Komence tio iom malhelpis ĝian prezentadon en Italujo. Aliflanke, en Britujo ĝia unua prezento ne sukcesis plenigi la koncertejon, ĉar oni konsideris ĝin tro katolika.

Kiam la Rekviemo unue aperis, iuj kritikistoj komentis, ke ĝi estas opero maskita kiel eklezia verko. Evidente mi mem ne aŭskultas ĝin kiel religian muzikon sed simple kiel koncerton. Aliflanke mi ne povas tute ignori la tekston, kiu enhavas ripetajn aludojn al la Tago de la Lasta Juĝo, la kolerego de Dio, la timo de

la ĉeestantoj, ilia pentado pro siaj pekoj, kaj ilia espero, ke tamen Dio ne kondamnos ilin al la Infero. Jen tipaj versoj el la teksto:

*Miaj preĝoj ne meritas tion, sed kompatu min, Ho Bonulo, por ke mi ne brulu eterne en la fajro.*

*Liberigu la animojn de ĉiuj fidelaj mortintoj el la doloroj de la Infero kaj la profundaĵo; liberigu ilin el la buŝo de la leono por ke la Infero ne englutu ilin kaj por ke ili ne falu en mallumon.*

*Mi tremas kaj timas la juĝon kaj la venontan furiozon, kiam la ĉieloj kaj la tero moviĝos. Tio estos tago de kolero, tago de katastrofo kaj mizero; certe granda kaj amara tago.*

Tiuj priskriboj de la venonta kolero alternas kun preĝoj, ke Dio tamen donu al la ĉeestantoj eternan pacon:

*Kiam la damnitaj estos detruitaj kaj donitaj al la fortaj flamoj, voku min por ke mi estu inter la benitoj.*

*Liberigu min, Ho Sinjoro, kiam la ĉieloj kaj la tero moviĝos; kiam vi venos por juĝi la mondon per fajro. Liberigu min, Sinjoro, de eterna morto en tiu terura tago. Liberigu min.*

Mankas en la teksto priskribo de la eterna vivo, kiun oni esperas atingi. La vortoj kaj la muziko multe pli koncentriĝas pri la kolero, la timo, la fajro, la suferado, la pentado ktp. Aŭskultante la verkon mi nature devas demandi min, ĉu Verdi efektive kredis pri tiu terura evento, kiun li tiel drame bildigis per sia muziko. Kiel la homoj povus vivi trankvile, se ili sincere kredus, ke ili estas je serioza risko esti torturotaj senfine pro la malgrandaj pekoj, kiujn ili faris dum siaj mallongaj vivoj?

Sed ja ekzistis homoj, kiuj sincere kredis je la Infero kaj la eterna suferado. Unu el tiuj estis Samuel Johnson (1709-1784), fama verkisto, kritikisto, spritulo, kaj kompilinto de la unua kompleta vortaro en la angla lingvo. Kiel protestanto, li ne kredis je Purgatorio; laŭ la klasika protestanta kredo, la elekto estas nur inter Paradizo kaj Infero. Li aktive timis la morton, kaj ofte skribis kaj parolis pri tio. Granda parto de lia timo ŝuldiĝis al lia konvinko, ke ekzistas tute reala ebleco esti kondamnita je eterna punado. Li iam skribis: "Ĉar mi ne povas esti certa, ke mi plenumis tiujn kondiĉojn kiuj necesas por ricevi savadon, mi timas, ke mi povus esti unu el tiuj, kiuj estos damnita."

Tio montras, kiel minacoj pri la Infero detruis la trankvilon eĉ de tiu granda intelektulo. Kaj tamen li ne estis krimulo, li ne estis murdisto, li ne detruis la vivon de aliaj homoj, male li ofte verkis kaj pensis pri moraleco. Lia sola serioza "peko" laŭ la tiamaj ideoj rilatis al seksaj agoj, kiujn ni nun taksas tute banalaj kaj neniel kondamnindaj.

Aŭskultante tiun eksterordinaran muzikon mi pensis, kiel kruela estas tiu religio kiu, almenaŭ dum pasintaj jarcentoj, plenigis la menson de la homoj per scenoj de teruro, de kondamno, de punado, pro relative etaj misfaroj. Kaj cetere, eĉ la plej teruraj misfaroj ne meritas senfinan torturadon sen espereto pri iama pardono.

# Neniu religio en la lernejo

*Christian Rivière (Francio)*


En la lasta numero de *Ateismo* (Novembro 2022, p. 15), Anna Lowenstein skribis: "Mi menciis mian propran opinion, ke religio en la pasinteco estis tiel grava parto de la socio, ke necesas instrui ĝin en la lernejo — sed tio signifas instrui *pri* religio kaj religioj, ne kredi ilin. Edukitaj homoj devus ankaŭ koni la bibliajn rakontojn, same kiel oni konas la grekajn mitojn — denove, tio ne signifas, ke oni nepre devas kredi ilin!" (do kiu ne konas tiajn aferojn, tiu ne estas edukita?!)

Kiam mi estis dekunujara, en la dua klaso de la kolegio, okaze de "kurso" pri historio, oni devis elteni, dum horoj laŭ pluraj monatoj, senĉesan prezenton pri tiuj neutilaj aferoj (interalie pri la "grekaj mitoj", poste pri "kristaĵoj"). Tiam mia patro havis la tedan manion alrigardi la paĝojn de mia kajero. Do mi tiom hontis pri la enhavo de tiu "kurso", ke mi zorge formetis kaj kaŝis la koncernatajn paĝojn. Mi ne povis imagi, ke mia patro vidos, kion oni "instruis" ĉi-rilate. Oni ne estas en lernejo por malŝpari sian tempon, sed por ricevi instruadon.

Miaj opinio kaj sento pri tiaj aferoj plu restas la samaj post kvindek kvin jaroj. Religio nepre estu kiel eble prisilentata, eventuale elvokata okaze de kurso pri historiaj faktoj. Sed la ĉi-supra diraĵo estas vere ŝoka, des pli en la bulteno de ATEO. Krom pro la konfuzo inter "edukado" kaj "instruado", kaj same inter "kono" kaj "scio", mi ne komprenas kial "kono de bibliaj rakontoj kaj de grekaj mitoj" estus parto de instruado (ĝi eĉ ne estas parto de edukado!).

La rolo de la instruado estas provizi la estontajn civitanojn per rimedoj pensi per si mem. Efektive, kono de la historio estas utila kontribuo, aldone al la studado de la landa lingvo, de la matematiko, de la geografio, de la filozofio, de la sciencoj, de la artoj. Sed detale prezenti la historion de la sciencoj, de la matematiko, de la artoj estus certe multe pli utile ol priskribi religiaĵojn.

Oni ne forgesu la rekomendojn de la Klerismaj famuloj de la antaŭaj jarcentoj. Nicolas de Condorcet: "La familio eduku, la lerno-institucio instruu kaj klerigu". Victor Hugo: "La edukon donas la familio; la instruon ŝuldas la ŝtato". Sed ambaŭ prave rifuzis sidlokon por la religioj inter la muroj de la publika lernejo.



(Bildo de: Tyson Cole)

# ĈIRKAŬ LA MONDO

## La Germana Katolika Eklezio suferas "doloran morton"



*Interne de la Kolonja Katedralo (Foto de: Martin Meissner / AP)*

Pasintjare, pli ol duon-miliono da anoj decidis forlasi membrecon en la Germana Katolika Eklezio. Tio estas la plej granda malkresko en ĝia historio. Laŭ la Germana Episkopara Konferenco, en la jaro 2022, 522 821 personoj forlasis la eklezion. Tiu kvanto multe pli altas ol la prognozo de la eklezio mem, kaj de aliaj spertuloj. La antaŭa rekordo okazis fakte dum la antaŭa jaro: en 2021, la katolika komunumo malkreskis je iom malpli ol 360 000 personoj. Ĉirkaŭ 21 milionoj da homoj membras en la eklezio, laŭ statistikoj de 2022. Tio konsistigas 24,8% de la loĝantaro.

Fakulo pri eklezia juro Thomas Schüller diris ke por la eklezio, refortiĝo estos tre malfacila. Parolante kun germanaj amaskomunikiloj, li rimarkis: "La Katolika Eklezio nun suferas doloran morton antaŭ ĉies okuloj".

La rapida membro-foriro, kiun influis skandaloj pri mistraktado de infanoj kaj akuzoj pri grandskala kaŝado de tiaj agoj, ŝokis klerikulojn. La instancoj kolektis pruvojn kiuj sugestas, ke la situacio eĉ pli malboniĝis ekde la publikigo de spertula raporto pri mistraktado en la ĉefdiocezo de Munkeno kaj

Freising, kaj ekde debato pri la ŝajna kunkulpeco de eksa papo Benedikto la 16a, kiu intertempe forpasis.

Dum la lasta jaro okazis juraj bataloj pri kompensoj por viktimoj de mistraktado en la urboj Kolonjo kaj Traunstein en Supra Bavario. Plue, oni akuzis Kolonjan kardinalon, Rainer Maria Woelki, pri mensogo rilate al lia scio pri tiaj okazoj de mistraktado, kaj ekde kiam li sciis. Pasintsemajne, la polico senaverte vizitis ekleziajn propraĵojn, inkluzive la hejmon de Woelki, kiu neas la akuzojn. Laŭ Schüller, la amasforlason el la Katolika Eklezio kaŭzis multaj motivoj, sed li diris ke la eventoj de Kolonjo agis kiel "brulsubstanco".

Tia forlaso ankaŭ signifas grandan perdon de enspezoj por la eklezio, kiu kolektas miliardojn da eŭroj ĉiujare, ĉu de impostoj, ĉu de dekonaĵoj. Ĉiuj germanoj, kiuj anoncas membrecon en la katolika, protestanta aŭ juda religio, oficiale registriĝas ĉe sia loka instanco. Ili estas leĝe devigataj pagi "Kirchensteuer" (eklezia imposto) aŭ "Kultursteuer" (kultura imposto), kiu kutime konsistas en sumo inter 8% kaj 9% de la kvanto pagata de tiu persono kiel enspeza imposto. Tiun monsumon la impostoficejo aŭtomate deprenas de la monata pago kaj plusendas al la religia organizaĵo.

Germanoj, kiuj intencas forlasi eklezion, devas oficiale malregistriĝi, per proceduro nomita *Kirchenaustritt* (eklezia retiriĝo), kiu konsistas en persona vizito ĉe loka oficejo kaj pago de 30-eŭra kotizo. Ankaŭ la Evangelia (protestanta) Eklezio, kiu same kiel la Katolika, implikiĝis en skandaloj pri mistraktado, suferis fortan membran malkreskon: ĉ. 380 000 personoj lasis ĝin dum 2022. Laŭ statistikoj de 2022, en ĝi membras 19,5 milionoj da homoj.

La eklezia imposto unue eniris la germanan leĝaron en 1919 kaj konfirmiĝis dufoje: unue en 1933, kadre de la Reichskonkordat, t.e. la interkonsento inter Nazia Germanio kaj Vatikano, kaj plej lastatempe en 1949. Najbara lando Aŭstrio enkondukis devigan imposton por katolikoj en 1939, post la aneksado de Aŭstrio la antaŭan jaron fare de Nazia Germanio. Tiu imposte neniam estis elstrekita, laŭ la klarigo, ke per tiu imposto oni strebas sendependigi ekleziojn de politika influo.

*Artikolo verkita de Kate Connolly por The Guardian, 2023-06-29 kaj tradukita por nia revuo de* ***Manuel Giorgini (Italio).***

# Kristanoj malpliiĝas en Usono

En 1972 90% da usonanoj nomis sin kristanoj. Laŭ artikolo aperinta en la usona eldono de *The Economist* (20 apr. 2023) tiu nombro intertempe falis al 64%. En 2019 4500 protestantaj preĝejoj fermiĝis, ĉar multaj paroĥoj tutsimple ne plu havis sufiĉe da membroj por pagi la fakturojn. (Necesas tamen mencii, ke en tiu sama jaro malfermiĝis 3000 novaj preĝejoj – do la situacio ne estas tiel katastrofa, kiel ĝi estas prezentita en la artikolo.)

Ĉiun dekan jaron, la Asocio de Statistikistoj de Amerikaj Religiaj Instancoj kalkulas la membronombron de ĉiu preĝejo en la lando. Temas pri giganta tasko, kiu koncernas centojn da kristanaj eklezioj kaj milojn da preĝejaj anaroj. La ciferoj por 2020 finfine estas disponeblaj. Ili prezentas maltrankviligan bildon por la ĉefaj kristanaj eklezioj; ili montras, ke la membronombroj de la "malnovaj" kristanaj konfesioj, ekzemple la metodistoj, luteranoj kaj episkopanistoj, rapide ŝrumpas.

Necesas tamen mencii, ke la nombroj de ĉiuj religiaj usonanoj kreskis je 7% inter 2010 kaj 2020 – aliflanke dum la sama periodo la tuta loĝantaro kreskis je 7,5%. Samtempe tamen la nombroj de episkopanistoj kaj metodistoj falis je 19%, kaj la luteranoj falegis je 25%. Sed la plej drasta malkresko trafis la presbiterianistojn, protestantan sekton kiu evitas ĉian okulfrapan ceremonion. Ili perdis preskaŭ milionon de siaj membroj dum tiu periodo, t.e. 40%.

Necesas atentigi, ke la falo ne estis tiel rimarkinda inter la evangeliistoj. Southern Baptist Convention, la plej granda kaj influa evangelia grupo, ŝrumpis je nur 11% dum tiu jardeko, malgraŭ pluraj tre ŝokaj skandaloj. Inter la kvindek plej grandaj religiaj sektoj, evangeliistoj estas inter tiuj, kiuj kreskas plej rapide. Ankaŭ la katolikoj asertas, ke ili gajnis preskaŭ 3 milionojn da membroj (temas pri 5-procenta kresko), kvankam ili devis fermi pli ol 1100 pregejojn.

Kio tiel draste misfunkcias ĉe la plej malnovaj usonaj eklezioj? Unu klarigo estas la aĝo de iliaj sekvantoj. La plejmulto de kristanoj ĉe la ĉefaj eklezioj aĝas pli ol 50 jarojn, kaj multaj aĝas pli ol 65. Nur proksimume unu el dek havas malpli ol 30 jarojn. Tutsimple la pli maljunaj membroj mortas pli rapide ol alvenas anstataŭantoj. Alia klarigo estas konvertado. Pli da homoj forlasas la ekleziojn ol aliĝas al ili.

Laŭ takso de Pew Research Center (senpartia instanco, kiu esploras sociajn tendencojn), se tiu evoluo daŭros, nereligiuloj povus fariĝi la plej granda grupo en Usono jam en 2055.

*Artikolo "American religion is becoming less exceptional" el The Economist, usona eldono, resumita de la redakcio de Ateismo.*

# Drasta falo en preĝeja ĉeestado en Pollando

La proporcio de katolikoj en Pollando, kiuj regule ĉeestas mesojn, falis de 37% al 28% en du jaroj, laŭ novaj ciferoj publikigitaj de la statistika instituto de la Katolika Eklezio. La eklezio atentigas, ke la plej novaj datumoj - kiuj datiĝas de 2021 - verŝajne estis trafitaj de la pandemio. Sed ĝi ankaŭ agnoskas, ke "socikulturaj faktoroj" ludis rolon en la malkresko.

La granda plejmulto da poloj estas oficiale identigitaj kiel katolikaj. Tamen dum la lastaj jaroj la reputacio de la eklezio estis difektita pro ĝia subteno por la nepopulara preskaŭ plena malpermeso kontraŭ abortigoj. Krome negative efikis la raportoj pri la seksa misuzo de infanoj fare de pastroj kaj la malatentado de la afero fare de iliaj episkopoj.

Ekde 1980, la Katolika Eklezio en Pollando ĉiujare faris esploron pri la nombro de homoj, kiuj ĉeestas mesojn kaj komuniiĝas. Unu dimanĉon ĉiujare, ĉiu paroĥo en la lando registras ciferojn kaj sendas ilin al la Statistika Instituto de la Katolika Eklezio (ISKK pollingve). La ISKK sekve kalkulas tutnacie, kiu proporcio de katolikoj kiuj teorie devus ĉeesti meson – t.e. homoj pli ol sepjaraĝaj, escepte de lit-malsanuloj kaj maljunuloj kun limigita moviĝpovo – fakte faris tion en tiu tago.

La plej novaj ciferoj montras, ke 28,3% ĉeestis mesojn en 2021, kio estis malkresko kompare kun la 36,9% en 2019 (la enketo ne estis farita en 2020 pro la pandemio). En 2011, la nombro staris je 40%; en 2001 je 46,8%; en 1991 je 47,6%; kaj en 1981 je 52,7%. Dume, la proporcio de komuniiĝantoj falis al 12,9% en 2021, estinte je 16,7% en 2019. Kontraste al la partopren-ciferoj, la komuniiĝantoj antaŭe pliiĝadis: de 8,1% en 1981 ĝis 10,8% en 1991, 16,5% en 2001 kaj 16,1% en 2011.

"La ciferoj por 2021 estis influataj de la pandemia situacio," komentas la vicdirektoro de ISKK Marcin Jewdokimow. "Oni devas memori, ke en 2020, pro kovidaj limigoj, neniuj datumoj estis kolektitaj. En 2021, ni kolektis datumojn malgraŭ la fakto, ke iuj limigoj ankoraŭ validis." La plej novaj datumoj estis kolektitaj la 26an de septembro 2021, en tempo kiam eniro en preĝejojn estis limigita al 50% de la sidspaco kaj ĉeestantoj estis devigataj uzi maskojn.

"En antaŭaj jaroj, la malkreskoj en la indico de *dominicantes* [amasa ĉeesto] estis konstantaj," aldonis Jewdokimow. "Ĉi-foje temas pri kolapso. Tial mi kredas, ke venontjare ni havos resalton, la statistiko montros pliiĝon." Samtempe, Jewdokimow agnoskis, ke "socikulturaj faktoroj" ankaŭ havis efikon sur preĝeja partoprenado. Sed li rimarkis, ke la ISKK ne esploras la kialojn malantaŭ la ŝanĝoj en la ciferoj, kiujn ĝi registras.

“Laŭ la longa perspektivo, ni traktas procezojn de socikulturaj ŝanĝiĝoj,” diris Jewdokimow. “Aliflanke, okazas iagrada reagordo de katolikismo kaj la loko de religio en la publika medio. La religiaj bezonoj de homoj ŝanĝiĝas kaj la maniero, laŭ kiu religiaj institucioj funkcias, ŝanĝiĝas.”

Alia esplorado ankaŭ indikis malkreskon en religia praktikado dum la lastaj jaroj. Enketado de CBOS, ŝtata esplor-institucio, konstatis en aŭgusto 2021, ke 43% de poloj praktikas sian religion almenaŭ unufoje semajne, granda malpliiĝo kompare kun la 69,5% en 1992. Tamen, 87% ankoraŭ deklaris sin kredantoj. Inter tiuj en la aĝ-grupo 18-24, religia praktikado falis de 69% en 1992 al nur 23% en 2021. Junaj poloj estas aparte videblaj en protestoj kontraŭ la eklezio. Enketo de IBRiS [*neregistara enket-instituto – Red.*] en 2020 trovis, ke nur 9% de tiuj en la aĝ-grupo 18-29 havas pozitivan opinion pri la eklezio.

*Artikolo de Daniel Tilles, ĉefredaktoro de la anglalingva retejo Notes from Poland (Notoj el Pollando), tradukita de la redakcio de Ateismo.*

## Elementaj lernejoj en Utaho malpermesas la Biblion

*Johannes Genberg (Svedio)*

La lastajn jarojn, iuj usonaj ŝtatoj komencis malpermesi certajn librojn en lernejoj. La kialo estas “protekti infanojn kontraŭ pornografiaĵoj kaj maldecaĵoj,” sed konsiderante kiuj libroj estas malpermesitaj, la kritikantoj asertas, ke la vera kialo estas la malpermeso de libroj pri seksaj kaj rasaj identecoj. Do, por malebligi sciigon pri transgenraj aferoj, kaj pri kritika ras-teorio.*

En decembro 2022, patrino en Utaho postulis, ke ankaŭ la Biblio estu malpermesita laŭ la nova leĝo, kaj nun kortumo samopinias kun ŝi, almenaŭ pri ties malkonveneco al junaj infanoj. La Biblio restas permesata en mezlernejoj. Nesurprize, konservativuloj koleras pro tiu juĝo, kaj opinias la Biblion ne malkonvena por infanoj, kvankam ĝi estas plena je perforto, fieco kaj torturoj.

Ankaŭ en aliaj ŝtatoj kun similaj leĝoj, homoj klopodas malpermesi la Biblion, kun pluraj sukcesoj.

La gepatroj, kiuj proponis malpermesi la Biblion, faris tion ĉar ili volis montri, ke la samaj arbitraj kritikoj pri maldececo kaj maltaŭgeco ankaŭ validas por la Biblio, kaj tiel montri, ke ĉio ĉi, verdire, temas pri simpla cenzurado laŭ politikaj temoj.

** Kritika ras-teorio estas teoria kadro en la sociaj sciencoj, kiu okupiĝas pri kritika ekzamenado de la manieroj laŭ kiuj la socio, kulturo, leĝfarado kaj amaskomunikiloj estas influataj de konceptoj pri raso kaj etneco.*

*Fontoj: BBC.com/news, Vikipedio anglalingva, news.sky.com*

# Junulinoj mortigitaj pro religiaj kialoj

*Pino Lalli (Italio)*

Emblema estas la kazo de pakistana junulino, Saman Abbas, murdita en Novellara, Italio de sia propra familio ĉar ŝi estis neobeema, kaj ribela kontraŭ la kutimoj pseŭdoreligiaj truditaj de antaŭjuĝoj popolaj. Kaj tio konfirmas la potencon de religio misprezenti la realon, malklarigi la sentojn plej naturajn por direkti ilin per nekompreneblaj devioj al rezultoj harhirtigaj por civila moderna konscienco.

Diversaj estis la kazoj de junulinoj murditaj pro manko de respekto por familia volo rilate al geedziĝoj aranĝitaj kun nedezirataj uloj, aŭ eĉ pri deviga vestad-maniero.

En Irano ekde la 16a de septembro 2022, post la murdo de Mahsa Amini, policanoj kaj soldatoj mortigis pliajn 76 virinojn dum tutlanda ribelo. Masoumeh estis 14-jaraĝa kaj estis seksperfortita de la Irana Revolucia Gvardio (Pasdaran) ĉar ŝi forigis la vualon kune kun siaj lernejaj kamaradoj. Saman Abbas malaperis inter la nokto de la 30a de aprilo kaj la 1a de majo 2021. Ŝi estis murdita de siaj gepatroj, onklo kaj du kuzoj. Ŝia patro mem ordonis strangoli ŝin ĉar ŝi kontraŭstaris truditan geedziĝon. Oni enterigis ŝin en fosaĵo tri metrojn profunda. *[Ampleksa artikolo pri la irana ribelo aperis en la novembra numero de 2022 – Red.]*



*Sanaa Dafani – mortigita de sia familio (Fonto: Facebook)*

La 15an de septembro 2009, vespere, apud Pordenone en Italio, 18-jaraĝa knabino marokdevena, Sanaa Dafani, estis mortigita de sia patro ĉar ŝi amis italan katolikan viron.

Ekde 1257 ĝis 1816 la Inkvizicio torturis kaj kondamnis al la ŝtiparo milionojn da senkulpaj personoj. Ili estis akuzitaj pri sorĉarto (kio plejparte trafis virinojn) kaj pri herezo kontraŭ religiaj dogmoj, kaj juĝitaj sen proceso, sekrete, per tortura teroro.

Bedaŭrinde la listo de misfaraĵoj kaŭzitaj de religiaj kredoj estas senfina.

# Portugalaj ateistoj sin turnas al la Konstitucia Kortumo

*Luís Ladeira (Portugalio)*




*La Konstitucia Kortumo de Portugalio, Lisbono (Foto de: Hugo Amaral / ECO)*

De la 1-a ĝis la 6-a de aŭgusto 2023, en Lisbono, okazos la *Monda Tago de la Junularo*, katolika evento al kiu la portugala ŝtato kontribuos pli ol 80 milionojn da eŭroj. Je la 3-a de februaro 2023, Portugala Ateista Asocio petis al la Konstitucia Kortumo klarigon pri la konstitucieco de tiu kontribuo. Ĝis nun ne venis la atendita reago. Eventuale la venonta numero de *Ateismo* registros la kortuman prijuĝon. Jen la teksto de la peto:

Al la Honora Prezidanto de la Portugala Konstitucia Kortumo:

Kiel Prezidanto de Portugala Ateista Asocio, organizo kiu reprezentas ateistojn, agnostikulojn, laikajn humanistojn kaj liberpensulojn en nia lando, mi venas, koncerne al la somera katolika evento *Monda Tago de la Junularo*, peti al via Moŝto opinion pri la konstitucieco de asigno de grandaj sumoj fare de ŝtataj instancoj – la registaro kaj

municipoj – por tiu religia evento. Ĉar ni vivas en laika ŝtato, kies konstitucio diktas apartigon inter eklezio kaj ŝtato, ŝajnas al ni, ke ni alfrontas kontraŭkonstitucian agon ĉikaze. Tial, ni demandas, ĉu la ŝtato, kiu estas laika, havas la rajton financi, antaŭenigi kaj faciligi rektan asignadon de milionoj da eŭroj al ununura religia strukturo, aparte favorante ĝin kaj malfavorante aliajn religiajn strukturojn. Tiusence, kaj surbaze de la argumentoj prezentitaj ĉi-sube, necesas ke la PKK klarigu la situacion.

**Konsiderante ke:**

- A. Laŭ la Konstitucio de la Portugala Respubliko, ni vivas en laika ŝtato;
- B. Laŭ Artikolo 41 de la Konstitucio, la Katolika Eklezio, same kiel la ceteraj religiaj komunumoj, estas apartigita de la ŝtato;
- C. Surbaze de la antaŭa punkto, ni povas konkludi, ke religio ne kontrolas la ŝtaton kaj, siavice, ke tio garantias religian liberecon al la loĝantaro;
- Ĉ. El punktoj A kaj B sekvas ankaŭ, ke la ŝtato ne povas doni preferan atenton al aparta religio, malprofite al aliaj religiaj komunumoj;
- D. Malgraŭ la antaŭa punkto, la Katolika Eklezio estas la sola religia instanco, kiu profitas finance de la *Monda Tago de la Junularo*;
- E. La sama religia institucio miliardulas, posedante grandajn konstruaĵojn kaj financajn agadojn tutmonde. Krome la portugala ŝtato liberigis ĝin de kelkaj impostoj, kiel ekzemple la municipa imposto pri konstruaĵoj;
- F. Malgraŭ tiu sana financa situacio, la portugala ŝtato injektas publikan monon grandskale en ĉi religian eventon: la Registaro planas elspezi pli ol 36 milionojn da eŭroj, la Lisbona Urba Konsilantaro disponeblas por investi ĝis 35 milionoj da eŭroj kaj la Urba Konsilantaro de Loures ĝis 9 milionoj da eŭroj. Entute, ĝi povas sumi pli ol 80 milionojn da eŭroj. Tamen tio ne sufiĉas: ni ĵus eksciis, ke la altaro de la Papo estis rekte aĉetita de la Lisbona Municipo kontraŭ pli ol 4 milionoj da eŭroj;
- G. La evento povus okazi se la Katolika Eklezio plene financus ĝin (ekskludante investon en publikaj infrastrukturo kaj sekureco, kiuj estas ŝtata respondeco);

**Krome, ankaŭ konsiderante ke:**

- I. La Konstitucio diktas en sia Artikolo 65, ke ĉiu havas la rajton al loĝejo kaj ke koncernas la ŝtaton antaŭenigi politikojn tiurilate;
- II. Loĝado estas socia problemo, kiu malprofitigas la civitanojn de nia lando, ĉu pro manko de domoj, ĉu pro altkostaj luadoj;

- III. La registaro kaj lokaj instancoj argumentas, ke mankas mono por sufiĉe investi en loĝejoj kaj ke ekzistantaj projektoj bezonas tempon por realiĝi, ĉar ili estas submetitaj al kompleksaj publikaj konkursoj;
- IV. "Mirakle" por ĉi tiu religia evento tamen troviĝas mono; kaj amaso da projektoj, kiel la altaro, estas pliaj ekzemploj de ŝtata favoro al aparta religio, kontraŭ la plej bonaj interesoj de la civitanoj.

Konsiderante ĉi tiujn datumojn, Portugala Ateista Asocio demandas al la Konstitucia Kortumo ĉu tio ĉi ne estas duoble kontraŭkonstitucia praktiko, ĉar ĝi malobservas la principon de apartigo de eklezio kaj ŝtato (Artikolo 41 de la Konstitucio) unuflanke kaj, aliflanke, ĝi malhelpas la investon en loĝado, kiu estas prema neceso por la civitanoj; alivorte, ĝi malhelpas la realigon de konstitucie garantiita rajto (Artikolo 65). Resume, ĉi tiu investo en loĝejoj, kiujn, laŭ la Konstitucio, la ŝtato devus havigi, ne povas esti efektivigita, ĉar publika mono estas enkanaligata al religia agado.

Portugala Ateista Asocio defendas la laikecon de la ŝtato, same kiel la principojn de toleremo kaj religia libereco. Tial ni subtenas la okazigon de tiu ĉi evento, tamen sen kostoj por la Ŝtato. Estas nekompreneble, ke instanco tiel riĉa kiel la Katolika Eklezio finance dependu de la portugala ŝtato.

Respondon pravigitan ni atendas, kies enhavon ni disvastigos publike, same kiel ĉi tiun peton.

Korajn salutojn

João Lourenço Monteiro

(Prezidanto de la Portguala Ateista Asocio)



# Nereligiuloj efike batalas balote: ilia grava rolo en usonaj elektoj

*Bill Maxey (Usono)*



*Usonanoj voĉdonas en elektoj (Foto de: Tony Dejak / AP)*

En Usono, en la lastaj jaroj kristannaciistoj sukcesis laŭgrade kapti la (konservativan) Respublikanan Partion. En septembro 2022, opini-enketo konstatis ke 61% de la membroj de tiu partio volas igi Usonon kristana nacio—malgraŭ tio ke ili scias ke tio estus kontraŭkonstitucia. Reage al tio, Andrew Torba, fondinto de la ekstremdekstra socia retejo Gab, certigis al siaj sekvantoj ke kristannaciistoj kaj la Respublikana Partio ja estas sinonimaj, kaj ke "ili komencos efektivigi la volon de Dio."

Kio estas kristannaciismo?

Amanda Tyler, la direktoro de la Baptist Joint Committee for Religious Liberty (Baptista Komuna Komitato por Religia Libereco), asertas ke kristannaciismo montras sin "la plej granda minaco al religia libereco en Usono hodiaŭ". Laŭ ŝi, "La politika ideologio kiu celas kunfandi usonajn kaj kristanajn identecojn havas profundajn radikojn en la usona socio kaj manifestas sin diversmaniere. Ĝi eternigas la falsan historion ke por esti aŭtenta usonano oni devas esti kristano—kaj ofte eĉ certa speco de kristano. Kristannaciismo subapogas kelkajn minacojn al religia libereco, inkluzive de kontraŭ-islama bigoteco, antisemitismo kaj registare subvenciita religio".

En opiniartikolo en *Newsweek* (7.11.2023), Tom Van Denburgh, fakestro pri komunikado de la asocio American Atheists, pli precize klarigas: "Kerne, kristannaciismo estas malaminda, ekskluda ideologio. Ĝi baziĝas sur la opinio, ke Usono estis, estas, kaj devas resti kristana konservativisma nacio, eĉ se tio signifas subigi judojn, progresemajn kristanojn, ateistojn, islamanojn, politeistojn kaj aliajn grupojn kiujn blankaj kristannaciistoj lokas malalte

en sia hierarkio: neblankulojn, GLAT-personojn*, virinojn kaj enmigrintojn".

Kristannaciistoj kredas ke kristanismo devas esti la sola agnoskita (aŭ almenaŭ privilegiita) religio en Usono kaj ke kiam la religiaj kredoj de unu persono konfliktas kun la civilaj aŭ homaj rajtoj de alia, la kredoj ĉiam atutas. Tio signifas, ekzemple, ne nur ke romkatolikaj kuracistoj rajtas rifuzi efektivigi abortigojn, sed ankaŭ ke, pro siaj "profunde tenataj kredoj", apotekistoj rajtas rifuzi plenumi receptojn por kontraŭkoncipiloj aŭ hormonoj por transseksuloj, ke bakisto rajtas rifuzi prepari edziĝ-kukon por geja paro kaj eĉ ke domposedanto rajtas rifuzi luigi loĝejon al islamanoj, GLAT-uloj aŭ paroj needziĝintaj. Ili apogas ankaŭ aferojn kiel kristanaj preĝoj kadre de registaraj kunsidoj, religiaj simboloj en publikaj lokoj kaj foje eĉ cenzurado de lernejaj studplanoj kaj bibliotekoj.

En la diversaj elektoj de novembro 2022, multaj kristanaj ekstremistaj kandidatoj en distriktoj kaj ŝtatoj kun grandaj konservativaj majoritatoj facile gajnis kontraŭ malfortaj konkurantoj. Ekzemple, kongresa reprezentantino Marjorie Taylor Greene, orgojle memspriskribita kristannaciisto, venkis sian Demokratan rivalon, ricevinte pli ol 65% de la voĉoj.

Gajnis je simile granda marĝeno Ron DeSantis, guberniestro de Florido, instiginte al la konservativuloj "surmeti la plenan armaĵon de Dio". Kampanja reklamilo lia komprenigis ke post la kreado de la mondo, Dio sentis bezonon de protektanto kaj do, la "okan tagon", aperigis ĝuste lin por ludi tiun rolon.

Sukcese reelektiĝis ankaŭ la guberniestro de Oklahomo, Kevin Stitt. Li sekve publike dankis al Dio pro la venko kaj dediĉis "ĉiun kvadratan colon" de sia ŝtato al Jesuo: "[Per] la aŭtoritato kiun mi havas kiel guberniestro, kaj la spirita aŭtoritato kaj la fizika aŭtoritato kiun Vi donas al mi, mi asertas ekposedon de Oklahomo por Vi".

Multe pli surprize, la impertinenta kongresanino Lauren Boebert, kiu reprezentas tre konservativan distrikton en Kolorado kaj insistas ke "la eklezio devas direkti la registaron", preskaŭ perdis sian sidlokon.

Malgajnis, tamen, la ekstremistaj respublikanaj kandidatoj por la plej alta posteno en du gravaj ŝtatoj. En Pensilvanio, Doug Mastriano, dekstrulo kun suspektindaj rilatoj kun antisemitoj kaj kiu i.a. kredas ke islamo ne kongruas kun la usona konstitucio, suferis humiligan frakason. Li ricevis nur 41,7% de la voĉoj dum 56,5% direktiĝis al Demokrato Josh Shapiro. Kontraste al tio, en Arizono malpli ol 1% de la voĉoj apartigis la Demokratan gajninton Katy Hobbs kaj la Trump-aprobitan Kari Lake: 50,3% respektive 49,7%. (Lake, dum sia kampanjo, sugestis ke la kristanoj en Usono estas persekutataj same kiel Jesuo kaj lia sekvantaro siatempe.)

Pli kuraĝige por progresemuloj, multaj sekularaj ŝtataj kaj federalaj leĝdonantoj—inkluzive de ĉiu el la 15 membroj de la kongresa liberpensa

interesgrupo—(re)gajnis siajn oficojn. Krome, referendumoj favoraj al la limigo de abortigrajto en du ŝtatoj definitive malprosperis.

Post tiuj ĉi elektaj malgajnoj, kelkaj kristannaciistoj, kiuj malgraŭ sia ekstremismo havas grandajn sekvantarojn pro siaj diversaj komunikkanaloj, esprimis malestimon al demokratio mem. YouTube-isto Dalton Clodfelter proponis nuligon de la 19a amendo de la usona konstitucio por forpreni de virinoj la rajton voĉdoni. Lia kamarado Nick Fuentes, venena antisemito, kiu subtenas la politikan superecon de kristanismo, eĉ pli senhonte proklamis: "Ni bezonas diktaturon. Ni bezonas akapari la amaskomunikilojn aŭ perforte preni sur nin la regadon kaj devigi la homojn kredi tion kion ni kredas".

Antaŭ tiuj elektoj, respublikanaj politikistoj en ŝtatoj kie ili regis aprobis multajn leĝojn kiuj celis diversmaniere malpliigi la voĉojn de (liberalemaj) minoritatoj. Spite al tiaj klopodoj, membroj de la nereligia komunumo balotis rekordnombre. Laŭ analizo de AP-raportisto Peter Smith, ĝuste al ili ŝuldiĝas la diferenco en ŝtatoj kies du partioj pli-malpli egalfortas: tie ili liveris la venkon al kandidatoj kiuj respektas la apartigon de religio kaj registaro. Proksimume kvar el kvin nereligiuloj voĉdonis kontraŭ proponita konstitucia limigo de abortigrajto en Miĉigano kaj Kentukio, tiel malhelpante ĝin venki. Simila elcentaĵo voĉdonis por Josh Shapiro, tiel certigante la malvenkon de Mastriano. "[Nereligiaj usonanoj] atentigas pri sia ekzisto", konkludis Smith. La lastaj elektoj pruvis kiel grava estas la bloko de nereligiaj voĉdonantoj.

Ateistaj voĉdonantoj aparte meritas agnoskon. Kompare kun fundamentismaj kristanoj, estas pli probable ke ateistoj donacos monon al kampanjo, ĉeestos politikan renkontiĝon aŭ aliĝos al manifestacio, laŭ enketo de esplorgrupo ligita al la universitato Harvard. "Kiam oni konsideras kiel engaĝitaj [ateistoj kaj agnostikuloj] estas en politika aktivado, oni ekkonscias kiel gravaj ili estas ĉe la voĉdonejoj", substrekis profesoro Ryan Burge, renoma fakulo pri religio kaj politiko.

Esplorado indikas ke nereligiaj voĉdonantoj nun konsistigas pli-malpli 22% de la tuto, kaj tio igas ilin, kiel blokon, same potencaj kiel romkatolikoj—kaj verŝajne pli unuiĝintaj. Tiu unueco manifestas sin en ilia apogo de religia-registara apartigo, reproduktaj rajtoj, klimata justeco, rajtoj de GLAT-uloj kaj rasa egaleco. Pew Research raportas ke "deziro por eklezia-ŝtata integriĝo preskaŭ ne ekzistas inter…tiuj sen religiaj ligoj".

Laŭ kelkaj fidindaj enketoj de la jaro 2022, 92% de ateistoj kaj 83% de agnostikuloj konsideras sin favoraj al abortigrajto; 70% de ateistoj kaj agnostikuloj konsideras klimatŝanĝiĝon almenaŭ "tre serioza" problemo; kaj 86% de agnostikuloj kaj 85% de ateistoj subtenas protektojn por GLAT-

personoj kontraŭ diskriminacio. Plue, oni trovis ke 83,7% de ateistoj malkonsentas ke "rasaj problemoj estas raraj, izolitaj situacioj", kio faras ilin demografie la malplej probablaj nei la ekziston de strukturita rasismo en la usona socio. Tiuj ĉi komunaj valoroj klare prioritatigas homajn rajtojn.

En 2017, usona ĵurnalisto Frederick Clarkson malkovris kaŝan iniciaton de koalicio de dekstremaj kristanaj grupoj kies celo, propravorte, estis—kaj restas—"protekti la eblon libere apliki tradiciajn judkristanajn religiajn valorojn kaj kredojn en la publika forumo, kaj regajni kaj prave difini la historion kiu subtenas tiajn kredojn". La kreintoj nomis ĝin Project Blitz (Projekto Fulmo) kaj kompilis kaj dissendis al Respublikanaj politikistoj en ĉiuj ŝtatoj manlibron kun tekstoj de modelaj leĝproponoj kaj klarigoj pri kiel efektivigi ilin. La strategio rekomendis komenci per enleĝigo de "senĝenaj" aferoj kiel deviga aperigo de la nacia devizo "Je Dio Ni Fidas" en ĉiu lerneja klasĉambro, sur aŭtomobilaj numerplatoj kaj sur oficialaj registaraj veturiloj. Poste, oni klopodu aprobigi aliajn projektojn kiel proklamado de "semajno de kristana heredaĵo" aŭ "tago de religia libereco". Tria ŝtupo proponas trakti aferojn kiuj celas "difini publikajn politikojn...favore al bibliaj valoroj koncerne al geedzeco kaj sekseco", do, ĝuste la polemikajn temojn kiuj nuntempe tiom agitadas la usonan socion: la rajton pri abortigo, la eblon de samseksaj paroj edz(in)iĝi aŭ adopti infanojn, la oficialan statuson de transgenruloj k.s.

Efektive, en la lastaj jaroj amaso da tre similaj leĝoj ekvalidis en konservativaj ŝtatoj kaj la kampanjo daŭras senbride. La efikoj pli kaj pli lezas la sekularecon de registaraj instancoj kaj forronĝas la religian liberecon de ĉiaj nekristanoj kaj la civitanajn kaj homajn rajtojn de aliaj minoritataj grupoj. Atakoj kontraŭ apartigo de ŝtato kaj eklezio troviĝas je ĉiu nivelo de la politika hierarkio. Pro la influo de la toksaj Trump-jaroj ili daŭre multobliĝas, aparte je la loka nivelo en miloj da konservativemaj komunumoj.

Almenaŭ ĝis la komenco de la jaro 2025, la plejmulto da kristannaciismaj projektoj eventuale enleĝigotaj de la Ĉambro de Reprezentantoj havas nenian ŝancon sukcesi ankaŭ en la Senato, kiu nun havas (minimuman) Demokratan majoritaton. Pro tio, tiuj kiuj propagandas la kristanannaciisman programon saĝe direktas siajn klopodojn ĉefe al la leĝdonaj instancoj de la individuaj ŝtatoj.

Tiurilate agas Sean Feucht, kristana muzikisto kaj politika aktivisto kies religiaj eventoj en diversaj landoj altiras milojn da fideluloj. Li skribas en artikolo en *Charisma* (5.5.2023), ke "ne ekzistas alia normo por subteni virton, pacon kaj prosperon por nacio krom la biblia morala juro". Pro tio, "Ne estas diskuteble por ni sentime deklari ke ni volas ke kristanoj ellaboru la leĝojn de la lando laŭ la vorto de Dio". Sekve li anoncis ke li kaj lia bando iros "de

ĉefurbo al ĉefurbo tra la tuta lando", klopodante influi la leĝdonantojn en ĉiu kapitolo** tiel ke ili sekvu la rekomendojn de Project Blitz kaj profitu ajnan okazon proponi leĝojn radikitajn en "tradiciaj kristanaj valoroj".

Al nereligiuloj kaj aliaj progresemaj usonanoj la daŭra vigleco de Project Blitz kaj la ĉieaj manifestaĵoj de la diversaj malbonvolaj facetoj de kristannaciismo vere efikas maltrankvilige. Tiu ideologio sen ajna dubo rolos grave en la decidigaj voĉdonadoj de 2024. La fakto ke la rezultoj de multaj lastatempaj elektoj decidiĝis per nur 2-3 elcentoj reliefigas kiom da apogo—aŭ almenaŭ de senĝena akceptemo—ekzistas en Usono por la kristannaciisma idearo kaj kiel proksima la lando—oficiale nediskuteble sekulara—troviĝas al teokratio.

Hodiaŭ, Project Blitz montras sin pli potenca ol iam antaŭe. Ateistoj kaj iliaj aliancanoj troviĝas inter tiuj kiuj klare komprenas la minacon starigitan de tiu agado trude malhonesta kaj ekspluata. Ili do forte batalas kontraŭ kiel eble plej multaj de la atencoj kontraŭ vera religia libereco. Tamen, la rimedoj—kaj monaj kaj homfortaj—de la liberaluloj ege magras kompare kun tiuj de la impeta kristannaciisma ofensivo. Bonŝance ekzistas profunde engaĝiĝintaj organizaĵoj kiel American Atheists, Americans United for Separation of Church and State, kaj la Freedom from Religion Foundation, kies spertaj kaj celkonsciaj aktivuloj senĉese luktas kontraŭ senhonta sektismo ĉe registaraj instancoj kaj publikaj edukejoj. Sed la religia armeo havas multe pli da insidaj strategiistoj kaj miliardojn da dolaroj por subvencii siajn kampanjojn. La milito estas malfacila, multekosta, konstanta kaj laciga.

Evidente, la plej efika solvo kuŝas ĉe la voĉdonejoj: forigi ĉiujn kristannaciistojn. Nepregas ke ateistoj, agnostikuloj kaj aliaj nereligiuloj daŭre voĉdonu kaj agadu grandnombre. Ne eblas lasi ke fanatikuloj perforte trudu siajn teokratiajn kredojn al la mensoj kaj korpoj de siaj ceteraj samlandanoj. Do, obstine antaŭen! Paŝon post paŝo!

Lamentinde, definitive venki tiujn malignajn fortojn montriĝas aparte defia tasko, ĉar Respublikanaj politikistoj en Usono havas multe pli da potenco ol ili meritas laŭ la landa demografia konsisto—rezulto de kelkaj strukturaj difektoj en la federala konstitucio kaj la senhonte ruzaj (tamen ne kontraŭleĝaj) partiaj agoj de malbonvolaj ŝtataj leĝdonantoj. Tio, tamen, estas alia historio.

*gejoj, lesbaninoj, ambaŭseksemuloj, transgenruloj

**konstruaĵo en ĉiu usona ŝtato, kiu servas kiel ĝia leĝfarejo

*Artikolo parte verkita surbaze de la artikolo "Nonreligious Voters Determined Outcome of 2022 Midterms" aperinta en American Atheist, Vol. 60, No. 4 (2022).*

# ATEISMO

## ENHAVO


**Vorto de la Redaktoro**

**Ateisma Vivo**

Ni kaj ili: ĉiuj lernu ĉefe *pri* 3

La malsamaj vojoj de religiuloj kaj ateistoj 5

De malsamaj pensmanieroj ĉiuj povas lerni 6

Ateistoj kaj religiuloj: ideoj pri reciproka lernado 7

Ĉu nekredantoj povas ĝui la avantaĝojn de religio? 10

**Pripensigoj**

Pri la nocio de dio 13

Kruela religio 15

Neniu religio en la lernejo 17

**Ĉirkaŭ la Mondo**

La Germana Katolika Eklezio suferas "doloran morton" 18

Kristanoj malpliiĝas en Usono 20

Drasta falo en preĝeja ĉeestado en Pollando 21

Elementaj lernejoj en Utaho malpermesas la Biblion 22

Junulinoj mortigitaj pro religiaj kialoj 23

Portugalaj ateistoj sin turnas al la Konstitucia Kortumo 24

Nereligiuloj en Usono efike batalas balote 27



Bonvolu sendi viajn artikolojn al la redaktoro:
ateismo.bulteno@gmail.com
Por informoj bonvolu skribi al la sekretario:
anna.lowenstein@esperanto.org
Prezidanto: Giridhar Rao, Barato
Vicprezidanto: Dominique Simeone, Francio
Sekretario: Anna Lowenstein, Britio
Redaktoro: Nyegosh Dube, Pollando
Lingva kontrolo: Anna Lowenstein, Britio
Kasisto: Dieter Rooke, Svislando
Grafikisto: Lautaro Croce, Argentino
Jarkotizo: 10 eŭroj (A-landoj) / 8 eŭroj (B-landoj)
Por ricevi la paperan revuon, bonvolu aldoni 2 eŭrojn
Konto: **ateo-y** ĉe UEA